

AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ

Accademia
Internazionale
delle Scienze

International
Academy
of Sciences



San Marino

Internationale
Akademie
der Wissenschaften

Académie
Internationale
des Sciences

9a itala studadesio lige al la 26a

SANMARINA UNIVERSITATA STUDADESIO

SUS 26

Rimini (I) • San Marino Città (RSM)

2003.08.30 — 09.6 / 1702–1703 pfr

Nona sessione universitaria italiana in collegamento con la
ventiseesima Sessione Universitaria Sanmarinese

Neunte italienische Studientagung in Verbindung mit der
sechszwanzigsten Sanmarinesischen Universitären Studientagung

Ninth italian university session connected with the
twenty-sixth Sanmarinian University Session

Neuvième séance universitaire italienne liée avec la
vingt-sixième Séance Universitaire Sanmarinienne

*Laborlingvoj · Lingue di lavoro · Arbeitssprachen · Working languages · Langues de travail
la Internacia Lingvo (ILO) • italiano • Deutsch • English • français*

Programo

La studadsesio okazos en du ŝtatoj: en la itala urbo Rimini (en la kvartalo San Giuliano Mare) kaj en la ĉefurbo de la Respubliko de San Marino.

La sciencajn kursojn kaj prelegojn kaj ceterajn programerojn planitajn de lundo ĝis ĵaŭdo 9–16 h vi povas sekvi en Rimini, en la mezlernejo. Vendrede (5.09) ni invitas vin por la tuta tago al la Respubliko de San Marino, kie okazos i.a. la publikaj finekzamenoj de la kandidatoj de AIS. Ĉiuj aliaj programeroj, kiel la semajnfinaj aranĝoj kun lingvokursoj, kunsidoj kaj la vespera parto estas lokitaj en Rimini en la salonoj de la kvartala paroĥejo, ĉe la strato Zavagli, tre proksime al la ĉefa kursejo (vidu la mapeton). La precizaj adresoj de la sesiejoj estas:

- kvartala paroĥejo Rimini–San Giuliano Mare, ĉe Viale Carlo Zavagli 73
- Scuola Media 2 „Dante Alighieri“
Via Ennio Coletti 102
I-47037 Rimini
tel. +39/0541-52082
- Scuola Secondaria Superiore
Contrada Santa Croce 48
RSM-San Marino Città
tel. +378/0549-882790

En la ĉefa kursejo troviĝas konstanta SUS-oficejo. La partoprenantoj estas akceptataj ankaŭ dimanĉe (31.08) en la flankala saloneto ĉe V. Zavagli, 14:30–15:30 h.

I. OFICIALAĴOJ KAJ ALIAJ ARANĜOJ

dato	horo	okazaĵo	salono
31.08, dimanĉo	10:00–11:00	1a senatkunsido (nepublika)	Gandhi
	11:00–12:00	Ekzamenofico (membrarkunsido)	Gandhi
	12:00–13:00	Ekzamenofico (konsultoj)	Gandhi
	16:00–17:00	Asembleo de la Subtena Sektoro	Gandhi
	20:15–21:00	inaŭguro de la 26a SUS	Boulanger
1.09, lundo	20:30–21:00	sekcikunsidoj	Boulanger
2.09, mardo	20:45–22:00	fórumo pri akademaj rekomendoj	Boulanger
6.09, sabato	10:30–13:00	29a Ĝenerala Asembleo de SciS	Boulanger
	15:00–16:00	fermo de SUS	Boulanger

Ĉi-tiuj aranĝoj okazos en la salonoj ĉe Viale Zavagli.

II. SCIENCAJ KURSOJ

La sekvaj kursoj – validaj je po unu studunuo – okazos ekde lundo ĝis ĵaŭdo, 1–4.09, en la sama tempointervalo. Kursfinaj ekzamenoj okazos ĵaŭde en la salonetoj ĉe Viale Zavagli.

Kibernetiko (salono Schmidt)

- K 01 OProf. Dr. habil. Reinhard Fössmeier, München (D)
Enkonduko al la teorio de strategiaj ludoj, 9:15–10:45
• *Kursfina ekzameno: la 4an de septembro, 16:30–17:15*

Humanistiko (salono Komenský)

- H 01 AProf. Nina Korĵenevskaja-Gouriou, Miramas (F)
Alegorio en teatro, 11:00–12:30
• *Kursfina ekzameno: la 4an de septembro, 17:15–18:00*

En la kadra programo, paralele al la sciencaj kursoj la humanistika sekcio okazigas latinan simpozion (en la salono Descartes). La prelegoj okazos tie latinlingve. Detalojn bv. vidi sub p. VII, Kadra programo.

Struktursciencoj (salono Eukleides)

- S 01 OProf. Carlo Minnaja dr., Padova (I)
Cardanus, Fermat, Fourier: tri kolonoj de la matematiko, 13:30–15:00
• *Kursfina ekzameno: la 4an de septembro, 18:30–19:15*

Natursciencoj (salono Galilei)

- N 01 OProf. Hans Michael Maitzen dr., Wien (A)
La eksplodo de astronomia scio dum la pasinta duonjarcento, 11:00–12:30
• *Kursfina ekzameno: la 4an de septembro, 17:15–18:00*

Morfosciencoj (salono Gandhi)

- N 01 OProf. Dr. habil. Eva Poláková, Nitra (SK)
Projektado, 9:15–10:45
• *Kursfina ekzameno: la 4an de septembro, 16:30–17:15*

KURSRESUMOJ

Enkonduko al la teorio de strategiaj ludoj (OProf. Dr. habil. R. Fössmeier)

Verŝajne multaj esperantistoj unuafoje aŭdis pri strategiaj ludoj, kiam OProf. Reinhard Selten kaj Jonathan Pool publikigis sian libron pri „Lingvaj Ludoj“. Strategiaj ludoj ja okupiĝas pri strategio, tamen ili ne estas nuraj ludoj, sed aplikeblaj al situacioj el komerco, juro, politiko, milito kaj la ĉiutaga vivo; kaj iliaj paradigmoj, ekzemple la fama „dilemo de la prizonuloj“, faciligas la priskribon de realaj konkuraj situacioj. La kurso prezentas teorian enkondukon kaj praktikajn ekzemplojn.

Alegorio en teatro (AProf. Nina Korĵenevskaja-Gouriou)

Komence temas pri teoriaj aspektoj de alegoria verkado; poste pri la uzo de alegorio en la verkoj de Aristofano („Lizistrata“ kaj „Paco“), Lope de Vega („Fuente Ovehuna“), Kalderono („La vivo estas sonĝo“), Jarry („Ubu-reĝo“) kaj pli detale — Vladimir Majakovskij („Misterija-Buff“) kaj Romain Rolland („Liluli“). Siaspecaj alegorioj — paraboloj en la teatraĵoj de Bertholt Brecht („Rondkapuloj kaj pintkapuloj“, „La kariero de Arturo Ui, kiu povus ne realiĝi“ kaj „Turandot aŭ kongreso de Blankiguloj“).

La eksplodo de astronomia scio dum la pasinta duonjarcento

(OProf. Hans Michael Maitzen dr.)

Dum la tempodaŭro 1900–1950 okazis gravaj ŝanĝoj en la astronomia esplorado, ĉefe pro la disponeblo de novaj grandaj instrumentoj, kulminante en la alveno de la 5-metra teleskopoj de monto Palomar (Usono). Tamen dum la sekvinta duonjarcento la astronomia esplorado evoluis multe pli rapide kaj atingis novajn dimensiojn de scio pri la aĝo de nia Universo, pri la evoluo de nia Galaksio, pri la evoluo de steloj, aparte de nia Suno kaj pri la konsisto de nia planeda sistemo, inkluzivante la efikojn de astraj kolizioj (kometoj, asteroidoj). Ĉio ĉi ŝuldiĝas kaj al la enorma vastiĝo de la kalkulkapablo de elektronikaj komputiloj kaj al la konstruado de gigantaj novaj teleskopoj kaj sur la Tera surfaco kaj en la ĉirkaŭtera spaco.

Projektado (OProf. Dr. habil. Eva Poláková)

Celo de kurso estas doni informojn pri bazaj ekonoj de kreado de projektoj. Temas ne nur ĝenerale pri la kondiĉoj de eŭropaj projektoj, sed ankaŭ pri la praktika eklernado de farado de konkretaj projektoj uzataj ankaŭ en propra profesia kaj privata vivo.

III. LIBERAJ PRELEGOJ

La sciencaj prelegoj okazos dum la intervalo 15:00–15:40, en la sekcisalonoj.

Humanistiko (salono Komenský)

H-p1 S-ro Franco Bigatti dr., Savona (I)

La Romana kaj Japana civilizacioj, 1.09 (lun.)

Struktursciencoj (salono Eukleides)

S-p1 OProf. Horst S. Holdgrün dr., Göttingen (D)

Invariantoj, 2.09 (mar.)

Filozofio (salono Descartes)

F-p1 OProf. Dr. Helmut Angstl, München (D)

Pri kugno, 3.09 (mer.)

Natursciencoj (salono Galilei)

N-p1 ADoc. Mag. Alicja Lewanderska-Quednau, Haag (D)

Inspiracio por sana vivo kaj sukceso, 4.09 (ĵaŭ.)

Morfosciencoj (salono Gandhi)

M-p1 ADoc. Mag. Alicja Lewanderska-Quednau, Haag (D)

Kulturo – identeco – nacieco – internacia unueco, 2.09 (mar.)

M-p2 OProf. Dr. habil. Eva Poláková, Nitra (SK)

Problemario de la distanc-studado, 4.09 (ĵaŭ.)

PRELEGRESUMOJ

La Romana kaj Japana civilizacioj (d-ro Franco Bigatti)

Oni povas konstati frapantan paralelon inter la du civilizacioj, kaj mi ne sentas paroli pri simpla hazardo. Ambaŭ civilizacioj konis sian oran epokon kiam la moralaj kaj civilaj valoroj ricevis la plej grandan ŝaton. Kiam ambaŭ nacioj estis

regataj per severa obeo al leĝo esprimanta superan volon eĉ nekonatan, la civitanoj povis vivi en harmonio kaj socia ordo. Antaŭ paroli tiom multe pri la homaj rajtoj oni devus memori la devojn: la duobla historio klare montras tiun ĉi realecon. Malgraŭ la forpaso de jarcentoj kaj jarmiloj, Romo kaj Japanio montras du heredaĵojn kongruantajn kaj konvergajn al bone ordonita socia vivo: ilia postlasaĵo povas multe instrui al ĉiuj popoloj, ĉefe montrante, ke la materiaj bonaĵoj ne povas sekurigi la progreson kaj la veran ĝeneralan prosperon.

Invariantoj (OProf. Horst S. Holdgrün dr.)

Dinamikaj procezoj en la plej vasta senco ebligas transiron de stato al difinita alia stato. Per invariantoj ni povas kontroli, kiuj statoj post ripetitaj aplikoj de iu procezo povas rezultiĝi. Tiu metodo montriĝas tre utila, se ni volas pruvi negativan rezulton: iu stato tutcerte ne estas atingebla. Ni ilustras tion per ekzemploj.

Pri kugno (OProf. Dr. Helmut Angstl)

Vivi signifas travivi. Temo de la prelego estas kognaj travivaĵoj (intendaĵoj). Ili estas lingve priskribeblaj. Helpe de lingvo ni povas sisteme pensi, komuniki kun aliaj homoj kaj akiri konvinkaĵojn (evitendaĵojn). El konvinkaĵoj formiĝas kognaj mondoj, personaj kaj interpersonaj. Kio pri objektiva mondo?

Problemario de la distanc-studado (OProf. Dr. habil. Eva Poláková)

En prelego estas difinitaj bazaj terminoj de problemario de distanc-studado, kaj montritaj eblaj metodoj kaj formoj uzataj en planita distanc-studado kadre de AIS. Celo de prelego estas varbi akademianojn de AIS por aktiva enplektado en tiun ĉi formon de studado.

IV. LINGVOKURSOJ

La lingvaj kursoj pri la Internacia Lingvo okazos 30.08 (sab.) kaj 31.08 (dim.) en la saloneto malantaŭa (sabate) resp. antaŭa (dimanĉe) ĉe la strato Viale C. Zavagli 73. Ĉiu kurso valoras po unu studunuon.

L 01 AProf. Nina Korĵenevskaja-Gouriou, Miramas (F)
Ilo-kurso por komencantoj, 9:15–10:45, 13:30–15:00

L 02 ASci. Liana Tuĥvatulina, Dmitrov (RUS)
Ilo-kurso por progresintoj, 11:00–12:30 (sab., dim.),
15:00–17:00 (sab.)/15:00–16:00 (dim.)

V. KANDIDATAJ FINEKZAMENOJ

Ĉiu kandidato antaŭ sia finekzameno nepre devas esti enskribiĝinta al minimume 3 kursoj de SUS (se ne jam havas la bezonatajn atestojn), inter kiuj minimume unu devas esti el la sekcio, en kiu okazas la kandidatiĝo, minimume unu devas esti el alia sekcio. Maksimume unu atesto povas esti pri lingvaj kursoj. Entute estas bezonataj 4 atestitaj kursstudunuoj.

En almenaŭ unu kurso (kaj en almenaŭ du – se ĉiuj studunuoj bezonataj por la fina ekzameno estas akirataj dum la SUS) la kandidato devas partopreni la kursfinan ekzamenon ricevante minimume la noton 6/10 (aŭ 7/10 ĉe kurso el la instruteko, ekzemple el la interreto).

La Ekzamenofico atentigas kandidatojn, ke prezentiĝo al la fina ekzameno sen antaŭa, regularkonforma kompletigo kaj disponigo de ĉiuj necesaj dokumentoj al la Ekzamenofico povas kaŭzi aŭ rifuzon havigi mankantajn erojn nur post la publika fina ekzameno aŭ pagendan rekompencan superantan la normalan ekzamenkotizon pro la kromlaboro. Finan konstato pri la plenumiteco de ĉiuj kondiĉoj nuntempe necesaj por akiri la agnoskon de sciencista grado ĉe AIS oni ne plu ricevos pli ol du jarojn post la fina ekzameno. *Eksvalidiĝos do titol-agnoskoj, se eventuale skribe fiksitaj kompletigpostuloj ne estos dum tiuj du jaroj plenumitaj de la kandidato.*

Por eviti tiajn problemojn bv. ankoraŭfoje certiĝi, ĉu ĉiuj viaj ekzamen-dokumentoj jam troviĝas ĉe la Ekzamenofico!

La finekzameno por kandidatoj, kiuj celas originale aŭ per adapta adopto akiri ĉe AIS la agnoskon de akademia nivelo (bakalaŭreco, magistrecio, doktoreco aŭ habilit-doktoreco), okazos la 5an de septembro (vendrede) en la Respubliko de San Marino, laŭ la surloke afiŝota horaro. La kandidatprelegoj estas publikaj. Buŝaj fakekzamenoj (nepublikaj) kaj skribaj ekzamenoj – se necesas – okazos laŭ la horaro afiŝota de la Ekzamenofico.

La Ekzamenoficon por la jaroj 2000–2003 konsistigas

Direktoro: OProf. Carlo Minnaja dr.
Asistanto: ADoc. Joanna Lewoc

sekcio 1 (kibernetiko): OProf. Dr. habil. Reinhard Fössmeier
sekcio 2 (humanistiko): AProf. Mag. Heinrich Dingeldein dr.
sekcio 3 (struktursciencoj): OProf. Horst S. Holdgrün dr.
sekcio 4 (filozofio): OProf. Dr. Helmut Angstl
sekcio 5 (natursciencoj): OProf. Hans Michael Maitzen dr.
sekcio 6 (morfosciencoj): OProf. Dr. Günter Lobin dipl. paed.

Aliĝo

La aliĝilo estas havebla ĉe la Senata Sekretario, al kiu bv. ankaŭ resendi vian aliĝon (ADoc. Joanna Lewoc, Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, D-37077 Göttingen; blewo1@hrz.uni-paderborn.de). La aliĝformularon vi povas ankaŭ elpresigi el la interreto. Ĝi troviĝas sub la oficiala paĝo de la Protokolofico:

<http://www.ais-sanmarino.org/Protokolofico>

Tie, krom la elpresebla versio, ekzistas aldona ebleco aliĝi perrete — uzante la elektronikan formularon; ĉi lasta estas *senpere* vokebla ankaŭ per la adreso:

<http://www.uni-math.gwdg.de/ILo/AIS/PPo/retaligxo-sus26.php>

Bv. memori, ke aliĝoj ne estas prilaboreblaj sen laŭregula reguligo de la aliĝkoto. La SUS-aliĝo rajtigas vin

- partopreni publikajn oficialaĵojn kaj ĉiujn erojn de la kadra programo, pri kiuj la programbulteno aŭ SUS-ofico ne informas pri aparta pago,
- partopreni ĉiujn kursojn (sen rajto ekzameniĝi), prelegojn kaj finajn ekzamenigojn
- ricevi la programkajeron kaj, fine de la sesio, partoprenantaron,
- ricevi propran insignon, kiu konfirmas la laŭregularan aliĝon (por AIS-studentoj la insignon anstataŭas ilia aktuala legitimilo).

Bonvolu atenti, ke aliĝkoto ne kovras ekzamenkotojn, kurskotojn, tranokt-kotojn ks., kaj ne estas transdonebla al alia persono.

La aliĝkoto estas pagenda ankaŭ de *kursgvidontoj* kaj *prelegontoj* (nepre antaŭ la limdato por anonciĝoj je 2003-03-29; sen antaŭe konstatabla pago de la SUS-aliĝkoto la ofertoj ne povas esti konsiderataj por la programo). La *kandidatiĝo por ekzameno* estas pritraktebla ankaŭ nur post la alveno de via SUS-aliĝkoto.

Ĝis unu monato antaŭ la komenco de la sesio (t.e. ĝis la 2003-07-29) la aliĝkoto estas nur 0,3 AKU, poste 0,5 AKU. Koto por taga partopreno en la sesio estas po 0,2 AKU. La koto estas pagebla laŭ la jenaj manieroj (bv. nepre indiki la pagocelon kaj nomon de la aliĝanto):

- al la AIS-konto n-ro 2051-305 ĉe Postbank Hannover (bank-kodo 25010030); Swift-kodo PBNKDEFF250
- al la AIS-konto n-ro 10801167-724225-27004-901001 ĉe Bank Pekao S.A., VI O/Łódź; Swift-kodo PKOPPLPULDZ
- ĉeke — senpere al la trezoristo: Prof. B.-A. Wickström dr., Institut für Finanzwissenschaft, Humboldt Universität, Spandauer Str. 1, D-10178 Berlin; *tinkaze bv. nepre aldoni 10€ pro la bankkotoj*

Anoj de la Internacia Sciencista Kolegio povas pagi per sia individua konto (servobonhavo) ĉe la akademio. Se la stato de via servobonhavo ampleksas la necesan sumon, ne estas bezonata kroma ĝirado; la aliĝkoto estos deprenita aŭtomate post via anonciĝo al la sesio.

Tiuj dumvivaj subtenaj membroj kaj AIS-studentoj posedantaj validan studentan AIS-legitimilon akiritan antaŭ la 20a SUS estas liberigataj de la aliĝkoto, kiuj aliĝas *minimume unu monaton* antaŭ komenco de la studadsesio al la Senata Sekretario; alikaze estas krompagenda 0,2 AKU.

Personoj, kiuj intencas ekzameniĝi ĉe AIS, povas ricevi studentan legitimilon (la finekzamenantoj devas aŭ posedi aŭ esti posedinta la legitimilon kun la celata scienca grado). Ĝi validas ĝis la atingo de la studadcelo, sed ne pli longe ol 5 jarojn, kaj estas akirebla kontraŭ 0,5 AKU ĉe la Senata Sekretario ankaŭ dum la sesio mem. Interesatoj bv. disponigi sian aktualan foton (ĉ. 2 x 3cm).

Rimini — alveturo kaj ĝeneralaj informoj

Rimini estas atingebla per *flugmaŝino* (internacia *flughaveno*, en Miramare di Rimini (Via Flaminia 409, tel. 373132); ĝi distancas ĉ. 30 km de la urbo), per *trajno* (fervoja stacio de Rimini, ĉe la linio Bologna–Ancona) kaj per *aŭto* (Aŭtostrado de la Maro: A 14 Bologna–Ancona/Bari; ŝtata ŝoseo SS 16 Adriatica Ravenna–Ancona/Bari; ŝtata ŝoseo SS 9 Emilia Milano–Rimini). Al Ancona (ĉ. 100 km. sude de Rimini) venas *aŭtopramoj* i.a. el Albanio (Dures), Greklando (Igoumenitsa, Korfu/Kérkira, Patras), Kroatio (Bar, Split, Zadar), Turkio (Cesme); pramŝipoj veturas ankaŭ inter Ravenna kaj Catania.

Rimini posedas plurajn busliniojn. Al la kvartalo San Giuliano Mare, kie estas la sesiejo, gvidas la linioj 2, 4 kaj 8. Enurbaj busbiletoj kostas 1€ (aĉetante en busoj 1,50), karnedo de 6 biletoj 5€, de 12 – 8,50€; unuopaj biletoj validas 90 min; taga bileto (t.n. oranĝa): 3€, 8-taga: 11€. Biletoj estas haveblaj i.a. en cigaredvendejoj (*tabacchi*), trinkejoj (*bar*), ĉe kiosko apud la stacidomo, ĉe la stacidoma kafejo, de biletvend-aŭtomatoj. Bv. atenti, ke la bus-asocio de Rimini nomiĝas „Tram“, tamen tramoj en Rimini ne ekzistas. Taksi-kotoj: min. 4€ (plus ĉ. 1€/km). Pertaksia veturado de la stacidomo al la sesiejo kostas ĉ. 8–10€.

Por pli preciza orientiĝo helpas mapo de Rimini, senkoste ricevebla ĉe turismaj oficejoj de Rimini (ekz. vid-al-vide al la stacidomo).

Bv. atenti, ke ĉiuj italaj telefonnumeroj enprenas en la enurban numeron ankaŭ la urbokodan prefikson inkluzive la nulon; tial, telefonante en Rimini mem bv. antaŭe elekti la prefikson 0541; el eksterlando bv. antaŭe elekti +39 0541. Tio validas ankaŭ ĉe poŝtelefonoj.

(daŭrigo sur la paĝo 15)

**9a itala studadsesio lige al la
26a Sanmarina Universitata Studadsesio (SUS 26)
Rimini – San Marino Città, 2003.08.30 — 09.6 / 1702–1703 pFR**

	sekcio/salono	9:00–11:00	11:00–13:00	13:30–15:00	15:00–19:00	vespere**
SABATO 2003-08-30 /1702 pFR	Gandhi *	L 01 Korĵenev.-G. 9:15–10:45	L 02 Tuĥvatulina 11–12:30	L 01 Korĵenev.-G. 13:30–15	L 02 Tuĥvatulina 15–17	
DIMANĈO 2003-08-31 /1702 pFR	Galilei * Gandhi * Gandhi *	L 01 Korĵenev.-G. 9:15–10:45 1. senatkunsido <i>(nepublika)</i> , 10–11	L 02 Tuĥvatulina 11–12:30 ekzamenofico <i>(membrarkunsido)</i> , 11–12 ekzamenofico <i>(konsultoj)</i> , 12–13	L 01 Korĵenev.-G. 13:30–15 registriĝoj 14:30–15:30	L 02 Tuĥvatulina 15–16 Asembleo/SubS 16–17	Inaŭguro** 20:15–21
LUNDO 2003-09-1 /1702 pFR	1 Schmidt 2 Komenský 3 Eukleides 4 Descartes 5 Galilei 6 Gandhi	K 01 Fössmeier <i>latina simp. (prelegoj)</i> M 01 Poláková	H 01 Korĵenev.-G <i>latina simp. (kunsido)</i> N 01 Maitzen	Ts-K1 Ŝilo S 01 Minnaja	H-p1 (15:40)	sekcikunsidoj** 20:30–21
MARDO 2003-09-2 /1702 pFR	1 Schmidt 2 Komenský 3 Eukleides 4 Descartes 5 Galilei 6 Gandhi	K 01 Fössmeier <i>latina simp. (prelegoj)</i> M 01 Poláková	H 01 Korĵenev.-G. <i>latina simp. (kunsido)</i> N 01 Maitzen	Ts-K1 Ŝilo S 01 Minnaja	S-p1 (15:40) M-p1 (15:40)	forumo pri Akademiaj Rekomendoj** 20:45–22

	sekcio/salono	9:00–11:00	11:00–13:00	13:30–15:00	15:00–19:00	vespere
MERKREDO 2003-09-3 /1702 pFR	1 Schmidt 2 Komenský 3 Eukleides 4 Descartes 5 Galilei 6 Gandhi	K 01 Fössmeier M 01 Poláková	H 01 Korĵenev.-G. N 01 Maitzen	Ts-K1 Ŝilo S 01 Minnaja	F-p1 (15:40)	
ĴAŬDO 2003-09-4 /1702 pFR	1 Schmidt 2 Komenský 3 Eukleides 4 Descartes 5 Galilei 6 Gandhi	K 01 Fössmeier <i>latina simp. (prelegoj)</i> M 01 Poláková	H 01 Korĵenev.-G. <i>latina simp. (kunsido)</i> N 01 Maitzen	Ts-K1 Ŝilo S 01 Minnaja	N-p1 (15:40) M-p2 (15:40)	
VENDREDO 2003-09-5 /1702 pFR	4 Descartes Boulangier ^{RSM}	<i>latina simp. (prelegoj)</i>	<i>latina simp. (kunsido)</i> Publikaj finekzamenoj ^{RSM} 10–13:30			
SABATO 2003-09-6 /1703 pFR	Boulangier**	Ĝenerala Asembleo (SciS) 10:30–13	Solena fermo 15–16			

* en Rimini — San Giuliano Mare, Viale Carlo Zavagli 73 (kvartala paroĥejo), en la antaŭa saloneto (Galilei)
resp. en la malantaŭa saloneto (Gandhi)

** sama adreso, en la granda salono (Boulangier)

RSM en la ĉefurbo de la Respubliko de San Marino (San Marino Città), en la salono de la liceo, Contrada Santa Croce 48

La salonoj estas nomitaj honore al la jenaj eminentuloj:

George BOULANGER (1909–1982)

Fondinto (en 1957 j.) de l'Association Internationale de Cybernétique (Namur, B) kaj ties prezidanto ĝis la morto; enkondukis en ĉi tiun asocion 1980 ILon kiel trian laborlingvon, eklerninte ĝin kiel 70-jarulo; vicprezidanto de la Eŭropa Klubo kaj membro de ties iniciatgrupo AIS.

René DESCARTES, latine: Renatus Cartesius (1596–1650)

„La patro de moderna filozofio“, kiel oni ofte nomas lin, provis ligi filozofion al la natursciencoj aplikante por ambaŭ racian metodon. Sian mekanikecan mondpercepton li aplikis eĉ en la psikologio. Li skizis ankaŭ principojn de planlingvo en letero de la 20a de novembro 1629 j. al la benediktana scienculo Mersenne.

EUKLEIDES de Aleksandrio (ĉ. 365 – ĉ. 300 a.K.)

Greka matematikisto kaj naturesploristo, kiu laboris sub Ptolomeos I ĉe la „Museion“ en Aleksandrio. Lia plej fama verkaĵo estas la libro „Elementoj“, aksioma prezento de la tuta tiama geometrio kaj aritmetiko. Krome li verkis inter alie manualon „Geometria optiko“ kaj aliajn traktaĵojn pri planimetrio, sfero kaj matematika muzikteorio.

Galileo GALILEI (1564–1642)

Kvankam liaj ideoj troviĝas kadre de la kristana mondkoncepto, la itallingva natursciencisto konfliktis kun la katolika eklezio pro sia verko pri la galaksimodeloj, en kiu li argumentas por la nova, kies centro estas la suno. Kiel unu el la unuaj sciencistoj li ne plu verkis en la latina lingvo, nekomprenata de pli vasta publiko.

Mohandas Karamchand GANDHI (1869–1948)

Hinda politikisto, kiu proklamis senarman ribelon kontraŭ la okupadaj trupoj, per manspinado kontraŭ la tekstilaj fabrikoj de Britio, per „salmarŝo“ kontraŭ la brita salmonopolo, per reiro al simpla natura vivoformo, por formi sendependan komunan ŝtaton de hinduoj kaj islamanoj. Li subtenis la ideon de la Internacia Lingvo, kunlaborante kun la svisa sciencisto Edmond Privat.

Jan Amos KOMENSKÝ, latine: Johannes Amos Comenius (1592–1670)

La fondinto de moderna pedagogio ne nur teorie, sed ankaŭ praktike kontribuis al sia fako, i.a. per facila lingvoinstrua legolibro. Li proponis la enkondukon de planlingvo kaj la starigon de internacia akademio de la sciencoj.

Hermann SCHMIDT (1894–1968)

Jam en la jaro 1941 la germana fizikisto kaj reguladteknikisto prezentis la bazajn principojn de kibernetiko. Ekde ĉ. 1962 li pli kaj pli influis la filozofion de la klerig-kibernetiko kaj de aliaj antropokibernetikaj branĉoj.

Pliaj informoj:

- urĝtelefonoj: polico 113, fajrobrigado 115, aŭtopaneo 116, kuracisto 118
- taksio: Radiotaxi Coop. p.le C. Battisti 1, tel. 50020
- informejo kaj stacidoma biletvendejo: tel. 53512
- havenadministrero: Via Destra del Porto 149, tel. 50211

Rimini — loĝado

Bonvolu memstare aranĝi vian restadon. Proksime de la ĉefa sesiejo (ĉ. 500–700 m.) troviĝas pluraj familiaj hoteloj, kiuj situas samtempe je 100–500 m. malfor de la marbordo. Jen kelkaj el ili:

- ♦ Corinna, 3-stela, viale Ortigara 66, tel. 50907, tel./faks. 23451
- ♦ delle Nazioni, 3-stela, v. Ortigara 37, tel./faks. 27844, info@hoteldellenazioni.info
- ♦ Maria Serena, 3-stela, viale Ortigara 31, tel. 26763, 21599, faks. 22888, info@hotelmariaserena.com
- ♦ Marselli, 3-stela, via C. Zavagli 77, tel. 24076
- ♦ Nuovo Belvedere, 3-stela, via Ortigara 25, tel. 24729, faks. 51958
- ♦ Ricchi, 3-stela, via C. Zavagli 119, tel. 22574, faks. 56156
- ♦ River, 3-stela, via Ortigara 21, tel. 26904, faks. 433337, rosagian@tin.it
- ♦ Villa Dina, 3-stela, via G. Tonini 49, tel. 24355, faks. 24969
- ♦ Amarcord, 2-stela, via Garattoni 27, tel. 21734
- ♦ Nini, 2-stela, via C. Zavagli 154, tel. 55072, 55273
- ♦ Lavinia, 2-stela, via Garattoni 10, tel. 23871
- ♦ Regent, 2-stela, via Ortigara 16, tel. 24140
- ♦ Savini, 2-stela, via C. Zavagli 111, tel./faks. 27153
- ♦ Serafini, 2-stela, via Rinaldi 20, tel. 55164
- ♦ Villa de Anna, 2-stela, via C. Zavagli 94, tel. 25722
- ♦ Bellombra, 1-stela, via C. Zavagli 125, tel. 55072
- ♦ Petula, 1-stela, via Tommasini 3, tel./faks. 27243
- ♦ Smarty Park, 1-stela, via Ortigara 41, tel. 27845

La hoteloj estas atingeblaj de la ĉefa stacidomo en Rimini per buso kaj mallongdaŭra piedirado. La kostoj por unu persono tage (kutime por min. 3 tranoktoj) inkluzive plenan pensionon (3 manĝojn), en 2-lita ĉambro atingas mezume ĉe ĉiuj listigitaj

hoteloj 30–40€. Apartaj deziroj estas plenumataj kontraŭ krompago. Estas konsilinde frue rezervigi ĉambron por la antaŭvidata tempo; samtempe kun la SUS okazos en la sama kvartala alia aranĝo, Ekumena Esperanto-Kongreso, kun kelkcentoj da partoprenantoj.

Ne ĉiuj hoteloj disponas pri sufiĉa parkloko, tamen ekzistas eblecoj starigi aŭton senpage ĉe apudaj stratoj aŭ sur pagendaj parkejoj.

Rimini — la urbo

Al Rimini apartenas pluraj kvartaloj, kiel (laŭmare, de nordo) Torre Pedrera, Viserbella, Viserba, Rivabella, San Giuliano Mare, Marina Centro, Bellariva, Marebello, Rivazzurra, Miramare.

San Giuliano Mare, kie okazos la itala parto de la sesio, havas belan plaĝon, taŭgan por kunvojaĝantaj familianoj aŭ paŭzoj en la programo. La centro de Rimini proksimas je ĉ. unu kilometro kaj posedas historiajn vidindaĵojn. La urbo estas fondita de romianoj kiel *Arminium* en 286 a.K. La regadon transprenis poste Ostrogotoj, Bizancanoj kaj Lombardoj. De la mezepoko ĝis al la Renesanco regis la Familio Malatesta, kiun postsekvis la Vatikana Regno, la Napoleona uzurpemo, la unuiĝinta Italio... Arto kaj arkitekturo de Rimini havas do sian plurjarcentan riĉan historion.

La *Arco d'Augusto*, konstruita kiel urba pordego 27 jarojn a.K. ankoraŭ nun bone servas kiel alirejo por tiuj, kiuj atingas la urbon de la antikva Via Flaminia. La urbocentro enhavas la plej belajn malnovajn konstruaĵojn: sur la *Piazza Cavour* vidiĝas la *Palazzo del Podestà*, la *Arengo*, la malnova fiŝmerkato kun karakteriza puto. Malantaŭ ĝi troviĝas la restaĵoj de la fortikaĵo de Sigismondo — la atestanto de la Malatesta-dinastio. Vizitinda estas ankaŭ la Malatesta-templo (renesanca arkitekturo el la 15a jarcento) kaj la urba muzeo, kie aparte rigardindaj estas kelkaj pentraĵoj de la Riminia pentroarto (14a jarcento). Krome, vi trovos en Rimini i.a. muzeon pri romiaj skulpturoj, muzeon pri ekstereŭropaj kulturoj *Dinz Rialto* kaj pinakotekon. De la romiaj tempoj konserviĝis i.a. la amfiteatro kaj la romia *Tiberius*-ponto, kiu bone kompletigas la unuan rondpromenadon sur la historiaj spuroj en la malnova urboparto; vi povas ĝin ankaŭ sekvi per biciklo, luebla en la urbo.

Interesan ekskurson al Rimini prezentis verŝajne la plej konata urbano kaj *maestro* de la itala filmo, la filmreĝisoro Federico Fellini. Inter la mitaj, imagitaj kaj simbolaj kulisoj de la urbo li montris la tute realan Grand-Hotel (ĉe Piazzale Fellini), la fontanon *della Pigna* kaj la ŝtuparon *Scalinata dell'Arengo* (Piazza Cavour), la kinejon Fulgor (Corso d'Augusto), la *murales* (Borgo San Giuliano), la moleon (Piazzale Boscovich), Palazzo Gambalunga (Via Gambalunga), la stacidomon (Piazzale C. Battisti) kaj kompreneble la strandon. Ne malmultaj trinkejoj, amuzeoj, manĝejoj nomiĝas Amarcord, Gradisca, Zampanò...

Al la novtempaj turismaj atrakcioj apartenas *Italia in Miniatura*: 272 konataj italaj konstruaĵoj etskale prezentitaj sur 8 hektaroj (SS16/Viserba di Rimini), la amuzparko *Aquafan*, la delfinejo en la limurbeto (sude) Riccione. En la proksimeco de la fabelparko *Fiabilandia* troviĝas la familia tombejo de Fellini. Vizitante unu el la parkoj vi ricevas rabaton por la alia, se vi konservas la bileton.

La lokaj specialaĵoj estas *piada*, *cappelletti*, *tagliatelle*, *passatelli*, fiŝo-*"rustida"*.

Pliaj informoj:

- turisma informofico ĉe la stacidomo: tel. 51331, infostazione@rimiturismo.it
- turisma oficejo: Piazzale F. Fellini 3, tel. 54019, faks. 54290, www.rimiturismo.it
- informcentro de la komunumo: corso d'Augusto 156/158, tel. 704112, faks. 704287
www.comune.rimini.it

Respubliko de San Marino

Vendrede, la 5an de septembro, la sesiaj aranĝoj okazos en la Respubliko de San Marino, kiu situas enklave en la centra Italio, je 10 km de rekta distanco for de la Adriatiko (24 km per ŝoseo al Rimini) kaj havas nur stratajn ligojn al Italio (somere ekzistas la eblo uzi helikopteron). Limaj transirejoj troviĝas en Dogana, Gualdicciolo, Chiesanova, Cerbaiola kaj Faetano. Kun la najbara Italio ekzistas dogana interkonsento, ne estas importaj/eksportaj limigoj; limaj kontroloj kutime ne okazas. En San Marino regas la itala lingvo, pagmono estas eŭro. Ekzistas nur landa telefon-prefikso: 378.

La ŝtato San Marino, laŭ la legendo fondita de Sankta Marinus en 301 p.K., respubliko ekde 1599 (*Serenissima Repubblica di San Marino*), etendiĝas sur ĉ. 61 km²; ĝi estas la plej malgranda respubliko kaj la kvina plej malgranda, sendependa ŝtato sur la mondo. Pli ol 28.000 civitanoj (2002) loĝas en la samnoma ĉefurbo kaj en 8 komunumoj. San Marino troviĝas sur la orienta deklivo de la etruskaj Apeninoj kaj limas kun la itala regiono *Emilia-Romagna* (norde kaj oriente) kaj kun *Marche* (sude kaj okcidente). Bildon de la ŝtato — bone videblan ĉe la alveturo de la ebenaĵo — dominas la tri montopintoj de *Monte Titano* (ĉ. 750 m) kun siaj turoj kaj kasteloj, spegulitaj sur la ŝtatblazono: *Rocca*, nomata ankaŭ *Guaita* (10/15 jc.), *Montale* (12 jc.) kaj *Cesta/Fratta*, de kiu la vido estas la plej pitoreska. *Rocca* kaj *Cesta* estas viziteblaj (muzeoj). La lazuran-blankan koloron de la sanmarina flago vi trovas en la emblemo de AIS. Rememore al la fondo de la respubliko, la 3an de septembro la sanmarinanoj festas Novan Jaron, ofertante abundan tuttagan programon: ekde prezentado de historiaj okazaĵoj en iamaj naciaj kostumoj, tra loterioj, ĝis al koncertoj kaj tradiciaj noktomezaj piroteknikaĵoj. Vendejoj en la *centro storico* estas kutime tiutage malfermitaj.

La ĉefurbo estas fermita por privataj aŭtoj (survoje ekzistas kelkaj grandaj publikaj parkejoj). *Aŭtobusoj* de Rimini al San Marino ekveturas ĉe *Piazza Tripoli* (plaĝo,

somere), ĉe la trajna stacidomo (ĉe la Placo L. Clementini) kaj ĉe Arco d'Augusto. Por ili ne validas la urba tarifo; bileto unudirekten ĝis al la ĉefurbo San Marino Città kostas ĉ. 5–6€. Busoj kursadas en ĉirkaŭ unuhoraj tempintervaloj; la unuaj (ambaŭdirekten) ekveturas ĉirkaŭ la 7:30, la lastaj — ĉirkaŭ la 19a h (busagentejo Bonelli, tel. 0541-372432; busagentejo Fratelli Benedettini, tel. 0549-903854)

Per *aŭto*, de Rimini, vi atingos la Respublikon veturante suden de Arco d'Augusto sur Via XX Settembre (poste Via Flaminia) ĝis al Via della Repubblica, kiu okcidenten kondukas al San Marino kaj al la aŭtostrado A14 (elveturejo Rimini-Sud). Lasante la aŭton en la urbo Borgo Maggiore vi povas komforte en kelkaj minutoj atingi la mezon de la ĉefurbo uzante la *telferon*. La *taksio* de Rimini ĝis al la ĉefurbo kostas ĉ. 30€.

En la urbocentro troviĝas la mezepoka placo *Piazza della Libertà*. La tri fortikaĵoj — ligitaj per piedirvojoj kaj remparoj — estas bone atingeblaj dum trankvila promenado, dum kiu surprizige malfermiĝas vastaj pejzaĝoj. Muroj ĉirkaŭas la ĉefurbon el tri flankoj. Irante laŭ ili vi rimarkos enkonstruitajn en ĝin pordegojn, preĝejojn, defendkoridorojn, turojn, mezepokajn domojn. Vizitante la urbon rigardu i.a. la registaran palacon *Palazzo Pubblico* (1894), la neoklasikan bazilikon *del Santo*, la ŝtatan muzeon, la galerion pri pentroarto. De la 14a jarcento konserviĝis la preĝejo *San Francesco*, ĉe kiu troviĝas pinakoteko kun bildgalerio. Simile indas rigardon la preĝejo *San Quirino* kaj la ekspozicio de artmetiaĵoj. Ĉe *Porta della Rupe* staras rimarkinda konstruaĵo de la iama monaĥejo *Santa Chiara* (16a jc.).

En Serravalle (urbo kaj komunumo de San Marino) troviĝas la kastelo de Malatesta, en Borgo Maggiore — moderna preĝejo kaj muzeo de poŝtmarkoj kaj moneroj, en Valdragone — preĝejo kaj monaĥinejo, en Pennarossa — ĉirkaŭirinda fortikaĵo.

Pliaj informoj:

- turisma informburoo: Palazzo del Turismo, Contrada Omagnano 20, tel: 0549/882400, 882410, faks. 0549/882575, www.omniway.sm

Mono

Kadre de AIS kostoj kaj prezoj estas indikataj ĝenerale en „Akademiaj Kotiz-Unuoj“ (AKU). 1 AKU valoras nun 65€. Subtenaj membroj same kiel ĉiuj membroj de la Internacia Scienca Kolegio (ISK), Internacia Arta Kolegio (IAK) kaj Internacia Teknika Kolegio (ITK) de AIS havas individuan subkonton („servo-bonhavo“), de kiu eblas i.a. senkosta ĝiro al aliaj individuaj AIS-kontoj kaj pago al AIS.

Al servobonhavo estas aŭtomate alkalkulataj honorarioj (ekzemple pro la laŭregulare realigita kurso aŭ prelego akceptita por la antaŭe presita programo), aŭtomate dekalkulata estas la jarkomence pagenda membrotizo. Kromaj dekalkuloj okazas

laŭ sciigo de la servobonhavo-posedanto (ekz. aliĝkotoj), se la kontostato tion ebligas.

Ĉe la SUS-oficejo ne eblas ŝanĝi monon inter diversaj monsystemoj. Ĝenerale estas akceptataj enpagoj nur en eŭro. En Rimini troviĝas pluraj bankoj, unu el ili proksime al la SUSejo. Bankoj estas kutime malfermitaj 9–13 h kaj ofte ankaŭ 15–16 h. La centra poŝtejo troviĝas proksime al la Arco d'Augusto.

SENATO KAJ SENATAJ OFICOJ 2000–2003

► Senatano pri publikaj rilatoj kaj informado; direktoro de la informofico

OProf. Dr. habil. Reinhard FÖSSMEIER (Vidirektoro: OProf. H.-D. Quednau)
Rahel-Straus-Weg 19, D-81673 München; info@ais-sanmarino.org

► Senatano pri akademia identeco, direktoro de la identecofico; prezidanto

OProf. Dr. habil. Helmar FRANK
Kleinenberger Weg 16, D-33100 Paderborn; hfr@uni-paderborn.de

► Senatano OProf. Horst S. HOLDGRÜN dr.

Mathematisches Institut der Universität, Bunsenstr. 3–5, D-37073 Göttingen
holdgrun@uni-math.gwdg.de

► Senatano pri publikigo kaj protokolado; direktoro de la publikig- kaj protokol-ofico; Senata Sekretario

ADoc. Mag. Joanna LEWOC (Vidirektoro: OProf. H. S. Holdgrün dr.
membro: OProf. Dr. habil. R. Fössmeier)
Karl-Schwarzschild-Weg 6/317, D-37077 Göttingen; blewo1@hrz.uni-paderborn.de

► Senatano pri honorado; direktoro de la honoradofico

OProf. Hans Michael MAITZEN dr.
Institut für Astronomie, Türkenschanzstr. 17, A-1180 Wien; maitzen@astro.univie.ac.at

► Senatano pri ekzamenoj; direktoro de la ekzamenofico; vicprezidanto

OProf. Carlo MINNAJA dr. (Asistanto: ADoc. Mag. Joanna Lewoc,
membro: OProf. Horst S. Holdgrün dr.)
Dipart. di Matematica Pura ed Applicata, Via Belzoni 7, I-35131 Padova, minnaja@libero.it

► **Senatano pri la akademia strukturo; direktoro de la strukturofiko**

OProf. Carlo MINNAJA dr. (Vidirektoro: OProf. Hans Michael Maitzen dr.)

► **Senatano pri esplorado kaj evoluigado; direktoro de la sciencofiko**

OProf. Fabrizio PENNACCHIETTI dr. (Vidirektoro: OProf. H. S. Holdgrün dr.)
Via delle Rosine 10, I-10123 Torino; fabrizio.pennacchietti@unito.it

► **Senatano pri studado; direktoro de la klerigofiko**

OProf. Hans-Dietrich QUEDNAU dr. (Vidirektoro: OProf. Dr. habil. R. Fössmeier)
Forstwissenschaftliche Fakultät, Am Hochanger 13, D-85354 Freising;
quednau@lrz.tu-muenchen.de

► **Senatano pri financoj; direktoro de la financofiko; trezoristo**

OProf. Bengt-Arne WICKSTRÖM dr. (Vidirektoro: OProf. H. S. Holdgrün dr.)
Institut für Finanzwissenschaft, Humboldt Universität, Spandauer Str. 1, D-10178 Berlin;
trezoristo@ais-sanmarino.org

SEKCIOJ KAJ FAKAROJ DE AIS

Kibernetiko Dekano: OProf. Klaus Weltner dr.

Schumannstr. 57, D-60335 Frankfurt; weltner@em.uni-frankfurt.de

- 1.1. **Antropokibernetiko** (psikokibernetiko, lingvokibernetiko, klerigkibernetiko, kibernetikaj komunikada kaj dokumentada sciencoj, socikibernetiko, ekonomikibernetiko)
- 1.2. **Ĝenerala kibernetiko** (teorio de informacio kaj kodigo, teorioj de algoritmoj, logikaj ŝaltretoj, abstraktaj aŭtomatoj kaj adaptivaj (celorientitaj) sistemoj, teoria informadiko, komputil-arkitekturo, ĝenerala teorio de retrokoplado kaj reguligo, teorio de strategiaj ludoj)
- 1.3. **Inĝeniera kibernetiko** (maŝina aŭ inĝeniera kibernetiko [teknologioj de telekomunikado, de informstorado, de reguligo, de komputiloj kaj de aŭtomacio, aplikata informadiko])
- 1.4. **Biokibernetiko** (genetiko, neŭrofiziologio, teorio de retrokoplado en organismoj, kibernetika medicino, komunikado kaj konduto de bestoj)

Humanistiko Dekano: OProf. Fabrizio Pennacchietti dr.

Via delle Rosine 10, I-10123 Torino; fabrizio.pennacchietti@unito.it

- 2.1. **Bazaj neparametraj antroposciencoj** (neparametraj psikologio, lingvistiko, klerigscienco, komunikada kaj dokumentada sciencoj)
- 2.2. **Soci-sciencoj neparametraj** (neparametraj pedagogio, administraci-scienco, sociologio, ekonomiko, etnologio, jurscienco, politologio)

- 2.3. **Artsciencoj neparametraj** (muzikologio kaj muzikhistorio, estetiko kaj historio de la porvidaj artoj, literaturscienco (speciale beletriko), estetiko kaj historio de la scenejaj artoj)
- 2.4. **Integraj kultursciencoj** (etnologio, socigeografio, kulturgeografio, kompara religiscienco, religihistorio, ekonomi-historio, ĝenerala historio, bibliotekscienco)

Struktursciencoj Dekano: OProf. Horst S. Holdgrün dr.

Mathematisches Institut der Universität, Bunsenstr. 3–5, D-37073 Göttingen;
holdgrun@uni-math.gwdg.de

- 3.1. **Pensadstruktursciencoj** (simbola logiko, teorio de (mal)precizaj aroj, ĝenerala aksiomati-ko, aritmetiko, nombroteorio, probablokalkulo, matematika statistiko, matematikdidaktiko)
- 3.2. **Imagadstruktursciencoj** (geometrio, kinematiko, ĝenerala sistemiko)
- 3.3. **Formalaj matematikaj sciencoj** (algebro, teorio de serioj, funkcioj, ekvacioj, distribucioj ktp., kalkuloj de vektoroj, matricoj, diferencialoj, integraloj, ĝenerala strukturteorio)

Filozofio Dekano: OProf. Dr. Helmut Angstl

Betschartstr. 14, D-81243 München; Helmut.Angstl@t-online.de

- 4.1. **Filozofiaj bazosciencoj** (filozofia logiko, ontologio, semiotiko, ĝenerala modelteorio, epistemologio)
- 4.2. **Filozofiaj valorteorioj** (filozofia estetiko, aksiologio, moralfilozofio, jurfilozofio, ŝtat-filozofio)
- 4.3. **Metasciencoj** (historioj kaj filozofioj de la unuopaj sciencoj kaj sciencobranĉoj, idehistorio, historio de la filozofio, historio de la unuopaj sciencoj)

Natursciencoj Dekano: OProf. Hans-Dietrich Quednau dr.

Forstwiss. Fakultät, Am Hochanger 13; D-85354 Freising; quednau@lrz.tu-muenchen.de

- 5.1. **Substancikoj** (fiziko, fizikaj teknologioj (konstruktado, mekanika teknologio, elektroteknologio, maŝinkonstruado), kemio, kemiaj teknologioj)
- 5.2. **Mondikoj** (geosciencoj kaj astrosciencoj [astronomio, meteorologio, geodezio, naturgeografio, geologio, paleontologio])
- 5.3. **Biosciencoj** (ĝenerala biologio, biometrio, botaniko, zoologio, klasika (t.e. bio-)ekologio, humanbiologio.);
Departemento pri medicino (medicino, bestomedicino, farmacio, nutradscienco)

Morfosciencoj Dekano: (komisiite) OProf. Dr. Günter Lobin dipl. paed.

Sylter Weg 11, 33102 Paderborn, blobi1@hrz.upb.de

- 6.1. **Aŭdvidaj formkreado kaj dokumentado** (sonstudioteknologio, grafika teknologio, sportscienco, filmstudioteknologio, sciencaj fotado, filmado, surbendigo ktp., muzeologio, parolteknologio, retoriko)
- 6.2. **Ilar-morfologio** (ergonomiko, formigo de industriaj produktoj, laborformteknologio, formigo de laborlokoj)

6.3. **Mediplanado** (arkitekturo, ĝardenformigo, agronomio, urba kaj regiona planadoj, trafikplanado, ĝeneraligita homo- kaj natur-ekologio, turismiko)

**Invito al la Asembleo
de la Subtena Sektoro**

Plenumante la artikolon 16.1 de la Apendico al la Statuto kaj la artikolon 1.7 (Bazaj preskriboj) de la Regularo pri kunsidoj estas kunvokata la Asembleo de la Subtena Sektoro de AIS al ties kunsido, kiu okazos dimanĉe, la 31an de aŭgusto 2003, 16:00–17:00 en Rimini — San Giuliano Mare, en la malantaŭa saloneto (Gandhi) de la paroĥejo ĉe Viale C. Zavagli 73. La tagordo estas:

1. Formalaĵoj (ĉeestanteco, kvorumeco, laborlingvoj, protokolo, tagordo, ĉeestrajto).
2. Ĝenerala raporto.
3. Financa raporto; senŝarĝigo, AKU-kurzo.
4. Decidoj pri proponoj skribe alvenintaj plej malfrue 24 horojn antaŭe.
5. Kromaj tagordaj punktoj eventuale antaŭe anoncitaj per invitletero aŭ deciditaj dum la tagorda punkto 1.
6. Elektoj.
7. Diversaĵoj.

**Invito al la Ĝenerala Asembleo
de la Scienca Sektoro**

Plenumante la artikolon 8.2 de la Apendico al la Statuto kaj la artikolon 1.8 (Bazaj preskriboj) de la Regularo pri kunsidoj estas kunvokata la Ĝenerala Asembleo de la Scienca Sektoro de AIS al ties 29a kunsido, kiu okazos sabate, la 6an de septembro 2003, 10:30–13:00 en Rimini — San Giuliano Mare, en la granda salono (Boulangier) de la paroĥejo ĉe Viale C. Zavagli 73. La tagordo estas:

1. Formalaĵoj (ĉeestanteco, kvorumeco, protokolo, tagordo, ĉeestrajto).
2. Ĝenerala raporto de la senato.
3. Financa raporto, senŝarĝigo, buĝeto.
4. Decidoj pri proponoj de la senato kaj pri aliaj proponoj skribe alvenintaj plej malfrue 72 horojn antaŭe kaj legeblaj en la SUS-oficejo almenaŭ 24 horojn antaŭe.
5. Kromaj tagordaj punktoj eventuale antaŭe anoncitaj okaze de skriba kunvokado aŭ deciditaj dum la tagorda punkto 1.
6. Elektoj.
7. Diversaĵoj.

La distribuo de materialoj aŭ la afiŝado kie ajn tio povus kaŭzi la impreson de aprobo de AIS bezonas la antaŭan permeson de la (vic)prezidanto aŭ de la direktoro de la Subtena Sektoro.

Dum la sesio bv. sekvi la plej aktualajn sciigojn de la SUS-oficejo anoncatajn sur la speciala afiŝejo.

© Kopirajto: AIS.

Stato: 2003-05-31/1702pfR (PPO/ji)

Prezo de la programo: 0,02 AKU (senpaga ekzemplero al aliĝintoj)